

Heinrich Heine,
Printemps saluto

tradukita de Ludwig Emil Meier

Iras ĉarma sonoret'
Tra de mi animon.
Sonu printemo kantet'
En la malproksimon!

Ĝis la dom' forsonu vi,
Kie floroj pendas!
Diru al la roz', ke mi
Saluteton sendas.

*Traduko de la Germana poemo “Frühlingsbotschaft” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (*1847-02-16 – †1919) en 1908.*

Arg-527-1045 (2010-03-14 15:53:26)

Tiu ĉi esperantigo de la poemo estas vere iom fuſe tradukita. Ĝi aperis en programo de koncerto el la jaro 1908 (laŭ informo de la dana s-ano Lars Kromann [lars.kromann@mail.dk]). Pri Ludwig Emil Meier rigardu ankaŭ la vikipedian retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier. Li verkis interalie la kantlibreton “Esperantista Kantaro”, kiu aperis en 1907 ĉe la Esperanta eldonejo de Hans Theodor Hoffmann en Berlino.

Heinrich Heine,
Frühlingsbotschaft

tradukita de Kálmán Kalocsay

Leise zieht durch mein Gemüt
Liebliches Geläute
Klinge, kleines Frühlingslied,
Kling hinaus ins Weite.

Kling hinaus, bis an das Haus,
Wo die Blumen sprießen,
Wenn du eine Rose schaust,
Sag, ich laß sie grüßen.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17).*

Arg-527-1043 (2010-03-14 15:54:47)

Tiu ĉi poemo troviĝas interalie ankaŭ en la reta kolekto “Gutenberg.Spiegel” sub http://gutenberg.spiegel.de/id=58&id=1136&kapitel=10&hash=3da378c6dbfruehlin#gb_found.

Heinrich Heine,
Softe vibras tra l’anim

tradukita de Kálmán Kalocsay

Softe vibras tra l’anim’
melodi’ tenera,
flugu al la malproksim’,
kanto primavera!

Flugu al florbeda dom’,
kaj se tie ĉarme
ridos roz’, en mia nom’
sin salutu varme.

*Traduko de la Germana poemo “Frühlingsbotschaft” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kalocso, *1911 – †1976).*

Arg-527-1088 (2010-05-27 11:29:19)

El la poezia volumo “Kanzonoj de Heine”.